# „Mortiga” interbatalo 1

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Gramatika ekzercado en divarsaj etapoj, praktikado de „ĉu”-demandoj kaj de demandaj adjektivoj (nepre necesaj por la tabel-vortoj). Alkutimigo al tuja reago, respondo. Ekmoviĝo, refreŝigo. |
| **Celgrupo:** | komencantoj, en diversaj etapoj |
| **Antaŭpreparo:** | necesas pilko, aŭ alia ludilo taŭga por ĵetado |
| **Tempo:** | 3 min. po unu batalo (plus anticipa klarigo, posta taksado) |
| **Nombro de ludantoj:** | minimume 6 |

La ludantoj estas en du grupoj kun po unu grupestro.
(Kaze de tiaspecaj ludoj estu ĉiam grupestroj – elektitaj ĉu de la instruisto, ĉu de la lernantoj mem – por solvi la problemajn situaciojn. Ili estu elturniĝemaj, kapablu bone reagi, ankaŭ sufiĉe bona en la lernata lingvo.)

Iu el la grupo „A” faras demandon per „Ĉu”, kaj tuj poste ĵetas la pilkon al iu el la grupo „B”. La „B”-grupano, ricevinto de la pilko, devas respondi per kompleta „NE-frazo (vidu sube) kaj nun li/ŝi demandas kaj reĵetas la pilkon al iu el la „A” grupo.
La gvidanto/instruisto notas la erarojn (- „vundojn”), kaj 5 eraroj egalas al minus 1 poento (aŭ 1 mortinto). Se iu ne povas en antaŭe indikita tempo (kelkaj sekundoj) fari demandon aŭ respondi, aŭ diras jam diritan demandon, same „mortas”, eliras el inter la ludantoj. Post 3 minuta batalado ni nombras la „vivantojn”, kaj notas la ciferon.

- Ĉe la sekva batalo la grupanoj faras demandojn per ***KI-demand-vortoj***.
- Se estas tria batalado, oni povas malplivastigi la temojn de la demandoj, ekzemple, eblas demandi nur per „***KIAL***”, aŭ nur rilate la veteron. La mortintoj prefere „reviviĝu” kaj reiru al la grupo komence ĉe la sekva batalo. Por ricevi la finan rezulton, la poentojn ni dividu per la nombro de la partoprenantoj de la unuopaj grupoj.

**Ekzemploj:**

| | **A-grupo** | | **B-grupo** |
|---|---|---|---|
| 1.) | Ĉu vi ŝatas matematikon? | → | Ne, mi ne ŝatas matematikon? |
| | | ← | Ĉu vi havas biciklon? |
| | Ne, mi ne havas biciklon. | | |
| | Ĉu vi estas saĝa? | → | Ne, mi ne estas saĝa. |

2.) Kio estas via nomo? → Mia nomo estas Petro.
Kiel vi fartas? → Dankon, mi fartas bone.
Kiam vi matenmanĝas? → Mi matenmanĝas je la oka horo.

3.) Kial vi ne ŝatas matematikon? → Ĉar mi ne komprenas ĝin.
Kial vi matenmanĝis hodiaŭ? → Ĉar mi estis malsata.
Kial vi lernas esperanton? → Por akiri ŝtatan lingvan ekzamenon.

Kia vetero estas hodiaŭ? → Hodiaŭ estas bela vetero.
Kian veteron vi ŝatas? → Mi ŝatas belan, sunan veteron.
Kiam estas neĝo? → Neĝo estas vintre.